

Informilo de Oktobro 2011

Numero 1, Oktobro 2011

Kopenhago: Unuiĝintaj Nacioj en la Universala Kongreso de Esperanto



En la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, en Kopenhago, Danlando, fine de julio, Unuiĝintaj Nacioj okupis tre videblan lokon. Subtene al la laboro de UN, Universala Esperanto-Asocio, la organizanto de la kongreso, aktive klopodas doni al ĝi atenton kaj eduki siajn membrojn pri la grava rolo, kiun UEA ludas en la internacia vivo. Jam en la unua tago de la kongreso, la 23-an de julio, oni starigis informan tablon en la t.n. Movada Foiro, en kiu la diversaj Esperanto-organizaĵoj prezentas sin al la Esperanto-publiko. Estrarano de UEA Stefano Keller, reprezentanto de UEA en Novjorko Neil Blonstein, oficiala reprezentanto de UEA ĉe UN Humphrey Tonkin, kaj anode la novjorka organiza grupo Steven Brewer estis inter tiuj, kiuj deĵoris ĉe la tablo.

En la Solena Inaŭguro de la kongreso la postan tagon laŭda kaj pozitiva [mesaĝo al la kongreso fare de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Irina Bokova](#), estis legita al la kongresanoj. “La Esperanto-movado,” skribis sinjorino Bokova, “persiste promocias egalecon inter la lingvoj, kulturoj kaj popoloj de la mondo.” En tio, ĝi similas Uneskon, kiu “estas konvinkita, ke multlingveco iĝis esenca por konservi la mirindan diversecon, kiu karakterizas la homaron.” Kaj sinjorino Bokova aldonis, “Unesko do aplaŭdas la grandegajn klopodojn de esperantistoj ĉie en la mondo dum la lastaj jardekoj.”

Ne nur venis mesaĝoj al la Inaŭguro: subtene al la devizo de la kongreso, “Dialogo kaj Interkompreno,” gravan paroladon faris sinjorino [Pernille Fenger, estro de la nordia oficejo de la Fonduso de UN pri Monda Demografio](#), en kiu ŝi defendis la laboron de UN kaj emfazis ĝian gravecon, interalie en protekto de la interesoj de gejunuloj tra la mondo – punkto aparte grava en tiu ĉi Jaro de la Junularo – kaj en realigo de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj.



Sepdeko da homoj partoprenis seminarion pri la strukturo de la UN-familio de organizaĵoj la 25-an de julio. Ĝin gvidis Stefano Keller, kiu ne nur rolas kiel estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj sed ankaŭ reprezentas la Asocion ĉe la UN-sidejo en Genevo, kaj Humphrey Tonkin, iama prezidanto de UEA kaj estrarano pri eksteraj rilatoj. Tonkin traktis ĉefe la grandajn liniojn de la strukturo de UN, dum Keller aparte emfazis la laboron de UN por homaj rajtoj.

La postan tagon okazis la kutima ĉiujara organiza kunveno pri UN-agado, en kiu oni raportas pri la laboro de la diversaj laborgrupoj en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo. Inter la temoj diskutitaj estis starigo de nova organizaĵo Esperanto por Unuiĝintaj Nacioj, kies celo estas unuflanke atentigi la esperantistojn pri la laboro de UN kaj aliflanke atentigi UN pri la lingva diverseco, lingvaj rajtoj, kaj la internacia rolo kaj potencialo de la Internacia Lingvo Esperanto.

(Fotoj de Neil Blonstein: 1. Humphrey Tonkin kaj Stefano Keller prezentas UN kaj Unesko; 2. Parto de la aŭskultantaro)

Bonn: UEA Aktivis ĉe UN-Konferenco

Kvin reprezentantoj de UEA partoprenis la ĉi-jaran Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado (DPI) de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn (Germanio) de la 3-a ĝis la 5-a de septembro. Tiu ĉi plej grava ĉiujara evento de UN por NRO-j okazis por la 64-a fojo kaj havis la temon “Daŭrigeblaj socioj — respondecaj civitanoj”. La konferencon malfermis Kiyu Akasaka, asista ĝenerala sekretario de UN pri komunikado kaj publika informado. Ĝenerala sekretario Ban Ki-Moon salutis la inaŭguron per videomesaĝo.

Kiel delegitoj de UEA partoprenis Marcus Cramer, Stefano Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer. Dum la konferenco ili havis multajn okazojn por interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-j kaj interŝanĝi ideojn, informilojn kaj kontaktkartojn.

La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj, komentante i.a. tion ke nur la angla estis laborlingvo de la konferenco. Al la demando de Keller pri la kialo, Maria-Luisa Chávez, ĉefino pri la rilatoj de UN kun NRO-j, respondis, ke tion kaŭzis nur manko de mono. Ankaŭ ŝi bedaŭris la neebulon uzi pli da lingvoj.

Dum unu el la rond-tablaj diskutoj Keller revenis al la afero post elpaŝo de reprezentanto de PepsiCo, kiu prezentis la klopodojn de sia firmao subteni la evoluon en la diversaj mondopartoj, kie ĝi fabrikas kaj vendas siajn varojn. Keller demandis, ĉu PepsiCo ne povus per subvencio ebligi ankaŭ uzon de aliaj oficialaj lingvoj de UN ol nur la angla ĉe similaj konferencoj, se ĝi jam faras tiom vastan "homhelpan" laboron. La estrarano de UEA ricevis la respondon, ke pri tio oni skribu al la oficejo de PepsiCo. La sama respondo venis ankaŭ al lia demando, ĉu la firmao, kiu ĉeestas en tiom da lingvoregionoj, ne povus meti ankaŭ Esperantajn vortojn sur siajn varojn.

Ĉe la rond-tabla diskuto pri civitana partopreno, Mélanie Maradan demandis, kiel la prelegantoj imagas la partopreneblon en tiu diskuto kaj en surloka agado ekz. de indiĝenaj popoloj, se oni uzas nur la anglan. Ŝi rimarkigis, ke ĝuste la koncernatoj ne povas partopreni en la diskuto kaj ke en la konferenco multaj reprezentantoj ne povas interveni pro nesufiĉa kono de la angla. Maradan demandis, kion oni intencas fari por solvi tiun problemon, sed ŝi ne ricevis respondon.

La delegitoj de UEA ĉeestis kelkajn laborgrupojn, kie ili aldonis al la diskutoj menciojn pri la neceso konsideri la rajton de ĉiu popolo je uzo de sia gepatra lingvo kaj je plukultivado de sia kulturo.

En kunsido kun la ĉefino kaj la stabo de la NRO-rilatada oficejo de UN Stefano Keller alparolis en Esperanto kun angla interpretado de Marcos Cramer. Li komentis diversajn kontakt- kaj informkanalojn de UN, kiu pli kaj pli uzas Facebook, Twitter kaj Youtube por rilati kun la civila socio. Kiel ekzemplon pri la agado de UEA, Keller menciis la novan retejon kreitan en Novjorko, kiu informas la esperantistaron pri la laboro de UN. Manfred Westermayer alparolis pri projekto realigata de esperantistoj en Afriko.

Jam komence de la konferenco estis publikigita malneta projekto de la fina deklaro, pri kiu la ĉeestantaj NRO-j povis komenti kaj fari proponojn pri ŝanĝoj kaj aldonoj. La teamo de UEA proponis aldonon de frazoj pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, pri kiuj la tekstoprojekto tute silentis.

La lastan tagon oni prezentis la kune finverkitan deklaron de la konferenco, el kiu tamen mankis la mencioj pri lingvaj rajtoj proponitaj de UEA, pri kiu ellaso Maradan protestis. Du el la tekstoprilaborantoj estis favoraj al lingvaj rajtoj, kaj private venis al Keller por sugesti denovan aldonon de la modifproponoj de UEA en la jam plulaboritan tekston. Tion Keller kaj Maradan faris, dum iliaj kolegoj Cramer, Noe kaj Westermayer plu kontaktadis reprezentantojn de aliaj organizajhoj.

Ankoraŭ dum kelkaj tagoj la respondeculoj pri la fina deklaro plu laboros pri ĝia teksto laŭ la lastminutaj plendoj kaj aldonproponoj. Kia ajn ĝi estu, kiel rezulto de la partopreno de UEA en la konferenco restos, ke la ĉeestintoj aŭdis pri lingvaj rajtoj, pri Esperanto kaj pri UEA. Sekve ili eksciis pri la defendado de lingvaj minoritatoj fare de esperantistoj kaj pri la uzo de Esperanto por interetna kompreniĝo, dialogo kaj komunikado.

Dokumentoj, videoj kaj fotoj pri la konferenco:

<http://www.linguistic-rights.org/eventoj>

(Laŭ la raporto de Stefano Keller.)

Vieno: Reprezentanto de UEA Estas la Nova Prezidanto de la Viena Packomitato

D-ro Hans-Michael Maitzen, reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe la UN-sidejo en Vieno, fariĝis la nova prezidanto de la NRO-Komitato pri Paco, unu el la komitatoj de la Konferenco de Neregistaraj Organizajhoj en Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj. D-ro Maitzen, Emerita Profesoro pri Astronomio en la Universitato de Vieno, transprenas la prezidantan rolon de d-ro Klaus Renoldner.

Kiel kaj Kial Aliĝi al Esperanto por Unuiĝintaj Nacioj

Esperanto por UN laboras por altigi la profilon de Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj disvastigi informojn pri Unuiĝintaj Nacioj inter la esperantistoj.

- UEA havas formalajn rilatojn kun UN kaj Unesko jam de la jaro 1954.
- Per sia oficejo ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, UEA flegas tiujn kontaktojn; laborgrupoj en Parizo, Ĝenevo kaj Vieno faras similan laboron.
- De tempo al tempo ni prezentas nian vidpunkton pri lingvaj demandoj en kunsidoj kaj konferencoj de UN kaj Unesko.
- Ni organizas konferencojn kaj seminariojn en Ĝenevo, Novjorko, Parizo....
- Ni atentigas pri la valoro de Esperanto kiel neŭtrala komunikilo inter la homoj kaj pri la problemo de lingva malegaleco ĝenerale.

Esperanto por UN

- lanĉis retpaĝaron en Esperanto pri UN kaj Unesko (www.esperanto-un.org).
- kreskigas subtenon por la laboro de UEA ĉe UN kaj Unesko
- sisteme disvastigas informojn pri UN inter la esperantistoj.
- argumentas por subtenado de UN per (1) informado al la publiko pri ĝia valoro, (2) instruado pri UN en la lernejoj, (3) konsciigo pri la valoro de internacia ordo, kaj (4) laboro por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn. Por fariĝi membro de Esperanto por UN simple necesas sendi al ni vian retadreson (sendu al info@esperanto-un.org) kaj preti ricevi de tempo al tempo informojn pri nia agado. Ni bezonas vian kunlaboron kaj vian subtenon. Membreco estas sen kotizo, sed se vi deziras subteni nian laboron finance, vi povas donaci al la Fonduso 777, ĉe Esperanto-USA aŭ ĉe UEA. Tiuj, kiuj donacas \$777 fariĝas anoj de la ekskluziva Klubo 777. Donacoj de usonanoj, de kiu ajn sumo, estas impostimunaj.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041